# la naska fasko

Ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero dek du
2008-07-15
Mardo

## Striku kun Brandono

Kiel la studantoj ĉe NASK eble jam scias, multaj laboristoj de UCSD nun strikas, kaj planas striki dum la semajno.

Hodiaŭ mi provos trovi la lokon de la manifestacio, kaj mi gvidos grupon de NASK-anoj por partopreni. Se vi interesiĝas, bonvolu grupiĝi antaŭ Asante je la 3:45 ptm.

*—Brandono*

## *Pli da aĉ(j)a ŝercado*

Kion PIV diris al PV?
"Mi ne povas."

*—Aĉjo*

## Komputila saĝo

Ĉirkaŭ 1960, pli-malpli, la Pentagono aĉetis grandan komputilon, eble la plej grandan ankoraŭ konstruitan, kaj certe la plej kompleksan kaj multekostan.

Venis la tago de ĝia unua uzado. Multe da generaloj aperis, kaj nur unu mizera soldato sidis ĉe la klavaro.

Unu el la generaloj ordonis, "Demandu al la komputilo: Ĉu okazos paco aŭ milito?"


La soldato entajpis la demandon. Dum kelkaj minutoj la komputilo meditis, kaj fine ĝi respondis: "Jes."

Furioze, la generalo kriis, "Jes, KIO?"

Obeeme, la soldato entajpis la duan demandon. La komputilo tuj respondis, "Jes, SINJORO!"

—Vido

## Kalembura kadro




La lasta enigmo estis **"EK-RANOJ"**.
La hodiaŭa estas: K _ _ - _ _ O J

## Por Henry

de Keneĉjo GOLDBERGO

Mi pensas pri vi, frato,
kiu komprenas min.

Mi pensas pri vi, frato,
tra la tutaj jaroj.

Mi pensas pri ni ridantaj,
ludantaj "Frenezaj Okoj",
marŝantaj ĝis la sepdek dua strato
por manĝi blincojn nokte.

Ŝtelinte boaton en la Centra Parko,
ni parolis.

Mi pensas pri vi, frato,
kiu komprenas min.

# El la kalendaro…

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe **http://esperanto.org/nask/kalendaro**


| | **mardo** | **merkredo** | **ĵaŭdo** | **vendredo** |
|---|---|---|---|---|
| **matene** | klasoj | klasoj | 9-10:20: klasoj<br>11-12:20: Amri WANDEL prelegas | klasoj |
| **post-tagmeze** | 3 ptm: Indu prezentas sariojn | 3 ptm: David JORDAN prelegas (lingvolaboratorio) | *libera* | *libera* |
| **vespere** | 7 ptm: kantu kun Koto (Asante #221) | 7 ptm: Hoss parolas pri veganismo (komuna salono) | 7 ptm: deklamu poezion kun Esther kaj diplomceremonio | *libera* |

### ★ 3 ptm: Indu prezentos *sarion*, nepalan vestaĵon

Indu informas nin: "je la 3-a mi volas prezenti al vi kiel nepalaj virinoj vestas sin per sarioj. Fakte, multaj fremdlandaj virinoj ŝatas tiun vestaĵon, kaj mi multfoje helpis ilin surmeti sariojn. Se vi interesiĝas pri tio, mi bonvenigas vin veni al la komuna salono."

### ★ 7 ptm: Kantu kun Koto

Koto gvidos komunan kantadon en Asante #221. Venu je la sepa kaj kunkantu!



*Dankon al Mar pro la krucvortenigmo!*

**Vertikalaj**

1. Kapvesto kun elstara ĉirkaŭrando.
3. Dombesto devenanta de lupo.
4. Peco de kolorita tolo, vidigita supre de masto.
5. Besto kun tre longa kolo kaj makulita felo.
6. Sepkolora vidaĵo en la ĉielo post pluvo.
9. Alta ŝuo kiu atingas ĝis genuo.
10. Remaĉulo kun grandaj disbranĉiĝantaj kornoj.

**Horizontalaj**

2. Besteto kiu teksas reton el tre maldikaj fadenoj, per kiu ĝi kaptas insektojn.
7. Vertebrulo, kun brankoj kaj nagiloj, vivanta en akvo.
8. Planto kun alta trunko kiu donas ombron.
11. Ronda ventroforma ujo uzata por enteni fluaĵojn.
12. Ovoforma frukto kun ruĝa karno.
13. Persono kiu ludas futbalon.
14. Tuta konstruaĵo, destinita por homa loĝado.
15. Muzika instrumento, per kiu oni ludas pinĉante aŭ frapante la kordojn.